ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 10

OKTOBRO 2022 Kol. 449/38

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Konferenco, Membrokunveno, UK Montrealo, Breŝo, Litovio, Lipnice, Čihošť, El la redakcio.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

## Konferenco de AEH en Pardubice 16. 9. 2022

La membrokunvenon malfermis la prezidanto de AEH Petr Angelov kaj ni kune dediĉis rememorojn al la antaŭaj prezidantinoj Jarmila Rýznarová kaj Lenka Angelová.
Poste Stanislava Nováková sciigis nin pri la mastrumado de AEH, kiu estas kvita. Pri la planoj por la estonteco parolis Petr Angelov.

Eva Pazourková demandis, ĉu estus eble kunligi la estraron de AEH kun la estraro de EK Pardubice, kiuj jam kunlaboras. Ni diskutos pri tio, sed ni opinias, ke la ĝisnuna kunlaboro estas bona kaj ne estas necese tion ŝanĝi. La diskuto pri tio daŭros.
Poste okazis elekto de nova estraro de AEH – do balotoj: estis elektitaj Petr Angelov, Stanislava Nováková kaj nova ano de AEH Andrea Šindelářová.

La partoprenantoj de la membrokunveno aprobis ankaŭ novan statuton, kiun la ĉeĥaj anoj de AEH ricevis en la ĉeĥa versio.

red.

## La membrokunveno de AEH

De la lasta kongreso de AEH en Hodonín u Kunštátu jam pasis kvin jaroj, do nia estraro decidis organizi denove la kongreson (laŭ la ĝisnuna statuto). Ni elektis la urbon Pardubice, nuntempan sidlokon de AEH. Nia kunveno okazis en la Domo de junularo, en la urboparto Dukla. Apud nia aranĝo okazis ankaŭ kongreso de Ĉeĥa Esperanta Asocio (ĈEA). La programo estis plejparte komuna.

La plej grava programo de nia kongreso estis baloto pri la nova estraro kaj samtempe pri la nova statuto. La baloto havis du partojn: unun okazis surloke, sed por tiuj, kiuj ne povis partopreni estis eblo baloti per interreto. Komence de la kunsido ni rememoris niajn forpasintojn, ĉefe sinjorinojn Jarmila Rýznarová kaj Lenka Angelová, kiuj estis tre gravaj personoj por nia agado. Poste estis tralegitaj la raportoj pri la agado kaj la financoj. Kiel ni ĉiuj scias, nia agado estis influita de la malsano Kovim 19, ĉar homoj ne povis renkotiĝi persone. Pro tio la plej grava afero estis la eldonado de nia gazeto Informilo. Pri la eldonado raportis sinjorino L. Srbová, kiu kune kun sinjorino M. Kosnarová preparas la gazeton.

Poste sekvis la baloto. Surloke balotis 29 membroj kaj per interreto 12, do entute 41 niaj membroj. Unue oni balotis pri la nova statuto de AEH. Ĉiuj membroj estis por, do ĝi estis aprobita.

Sekvis prezentado de kandidatoj por nia estraro, kaj baloto. Kandidatoj Petr Angelov, Stanislava Nováková kaj Andrea Šindelářová ricevis entute po 40 voĉoj, neniu estis kontraŭ, kaj unu sin detenis. El la nova estraro estis reelektita nova prezidanto de AEH, Petr Angelov. Pri la financoj zorgos sinjorino Stanislava Nováková.

La nova estraro prezentis planojn kaj intencojn por la venontaj jaroj, sed nia agado dependos plejparte ĉefe de la niaj membroj.
Sekvis sufiĉe vigla diskuto kaj estis videble, ke niaj membroj havas multe da ideoj por la laboro.
Post la plenkunsido kaj vespermanĝo ni spektis teatraĵon en Esperanto, kiun prezentis la teatra grupo DOMA de gimnaziaj studentoj el Svitavy. La spektaklo nomiĝis „Ludoj kun diablo“ kaj estis ankaŭ elsendita per interreto al la tuta mondo. Ĝi plaĉis al ĉiuj.
Vespere okazis planita vizito al la astronomia observatorio, kiu troviĝas proksime (en la Domo de infanoj). Tie jam atendis nin du astronomoj, kiuj dividis nin en du grupojn. Dum unu en la saloneto aŭskultis prelegon pri kosmo, la dua grupo iris al la teleskopo, kie ĝi havis eblon spekti Jupiteron kun ĝiaj lunoj, kaj observi nian Lunon. Poste la grupoj interŝanĝiĝis reciproke.
La sekva tago estis dediĉita al la plenkunsido de ĈEA – la asocio havis baloton.
Post la plenkusido kaj tagmanĝo interesiĝantoj povis trairi la historian parton de la urbo Pardubice kun la kastelo kaj ekscii ion pri historio kaj interesaĵoj. Parto de la interesiĝantoj vizitis ankaŭ la evengelian preĝejon kaj la lokon, kie estis eldonita la unua lernolibro de Esperanto por ĉeĥoj (de F. V. Lorenz).
Por ĉiuj estis ankaŭ preparita vizito en la Domo de la fajrobrigado. Tie estis al ni prezentita nova tekniko kaj laboro de fajrobrigadistoj. La partroprenantoj havis multe da demandoj kaj tre interesiĝis pri tiu malfacila kaj danĝera okupo.
La lasta tago estis dediĉita denove al traktado de ĈEA, al raportoj pri agado de lokaj kluboj kaj diversaj asocioj (UEA, KELI, IFEF ktp).
La resumo de la sukcesa semajnfino estas, ke AEH havas novan trimembran estraron, kiu plenumas sian taskon por membroj kaj

Esperanta agado. Kiel jure registrita asocio, ni devas plenumi niajn taskojn laŭ la ĝenerala leĝaro. Ankaŭ tio estas en ordo.
Ni volas danki al ĉiuj, kiuj helpis prepari la kongreson, ni dankas ankaŭ al tiuj, kiuj partoprenis surloke aŭ per interreto. Bonvolu resti agemaj kaj viglaj, ke nia asocio estu pli kaj pli sukcesa.

Ladislav Hakl

**Kelkaj miaj impresoj el la UK en Montrealo**

Mi kredis centprocente, ke la Universala Kongreso de Esperanto en Nitra estis mia lasta. Tamen, kiam venis propono de mia kanada amiko, ke li volus priparoli detalojn de la transdono de Esperanto-fako de mia eldonejo KAVA-PECH al li fine de la jaro 2024 kaj tial li pretas pagi mian tranokton en studenta hejmo, mi komencis pripensi la partoprenon. Konsiderante, ke mi kiel honora membro de UEA ne devas pagi la kotizon kaj ankaŭ tion, ke mia sanstato konsiderinde pliboniĝis, mi ne eltenis la tenton kaj do finfine forflugis al Montrealo por tie kongresumi.
Kaj la kongreso estis por mi alia ol la 25 antaŭaj, kiujn mi partoprenis kiel funkciulo de UEA, kaj do mi priskribos, pli ol pri kio oni traktis, miajn impresojn de ĝi.

Unue, mi estis seniluziigita, ke mi renkontis tie neniun el miaj amikoj, kiujn mi notis laŭ la listo de aliĝintoj, ke kun kiuj mi volas nepre renkontiĝi. La kialo estis, ke multaj rezignis pro kovimo, ĉu ĉar ili ne volis subiĝi al la kontraŭkovima vakcinado, aŭ ili ne pretis post la fino hejmen subiĝi al deviga dusemajna kvaranteno (ekzemple japanoj), aŭ ili ne ricevis vizon (rusoj, ukrainoj, afrikanoj,…). Do resume, plejparto de la parto-prenantoj estis kanadanoj kaj usonanoj, eĉ se ili portis

alian landon surŝilde (ekzemple mi babilis kun polo kaj ukraino, ambaŭ vivantaj en Usono, sed portantaj fiere en la ŝildoj UA kaj PL).



Sed aliflanke, mi tie renkontiĝis kun multaj novaj amikoj, ankaŭ el tavoloj, kiuj estis por mi iom ekzotikaj, ekzemple kun tre simpatia islamanino kaj indiĝeno el Brazilo parolanta denaske la tupian lingvon, kio rememorigis min je F. V. Lorenz, kiu verkis gramatikon de tupia lingvo. Ambaŭ flue parolis en Esperanto.



Grava novaĵo en la organizado de la UKoj, aplikata unuan fojon ĉi-jare, estas, ke ĝin ne preparas plentempa dungito de UEA dum la tuta jaro, sed nove kreita kongresa fako de UEA sub la gvido de Dorota Rodzianko (PL/SK), kiu havas en sia skipo ankaŭ sian fianĉon Petron Baláž kaj pliajn membrojn de E@I.

Plia interesaĵo tuŝanta nin estis, ke mi estis tie la ununura ĉeĥiano, sed ni estis tie du ĉeĥoj, ĉar la dua ĉeĥino Jitka Skalická, daŭre vivas en Italio, do portis sur la nomŝildo IT. Kompreneble mi partoprenis plurajn kunsidojn, kiuj trapasis kiel kutime, krom tio, ke oni devis surhavi interne maskojn, kion plejparto de la kongresanoj ne respektis. Tamen certe estas interesa ekzemple la rigardo al la estraranoj de UEA en maskoj dum la programero la UEA-estraro respondas.
La lasta, kion mi volas mencii, estis prezento de la libro *Amo, tuso kaj forpaso* kun la subtitolo *Homoj kaj kovimo*. Temas pri

finalistoj de la Interkultura Novelo-Konkurso kaj mi fieras, ke mi estis alparolita de la ĉefredaktoro, ĉu mi ne eldonus ĝin en mia eldonejo, kion mi kompreneble akceptis. Pro malavara anonima monsubtenanto ĝin ricevis ĉiu partoprenanto de la kongreso, tial ĝi estis presita en Kanado kaj mi kunportis nur 30 ekzemplerojn, la reston oni sendis al mi per poŝto. Tamen ilin mi ĝis nun ne ricevis. Kaj mi jam povas anonci, ke ĝi jam estas tradukita danke al Jindřich Košťálek en la ĉeĥan, kiun version mi eldonos espereble komence de novembro, eĉ kun belaj ilustraĵoj de Mirka Tomečková.

Petro Chrdle

## La 89-a Itala Kongreso de Esperanto en Breŝo
## 20. - 27. 8. 2022

Ĉi-foje ĝi okazis en la itala urbo Breŝo (Brescia), situanta en la norda parto de Italio, regiono de Lombardio, inter Milano kaj Verono. Apud la kastelo, kiu dominas la urbon, staras vapor-lokomotivo. La kongresejo troviĝis en la hotelo *Ambasciatori*. En la enirhalo instaliĝis akceptejo kaj libroservo.

Al la evento aliĝis pli ol 200 geesperantistoj, sed ne ĉiuj povis veni. Teresa Pomorska el Pollando venigis grupon de 27 adeptoj por Esperanto, kiuj entuziasme frekventis la Esperanto-kursojn, kiuj okazis en la apuda hotelo *Master*. La kurson por komencantoj gvidis pakistanano loĝanta en Italio, Mian Salam Shany, kaj la progresantojn instruis Marc Giraud el Francio. Eblis ankaŭ lerni la italan lingvon kaj okazis



ekzamenoj de IIE (Itala Instituto de Esperanto).
Kiel jam sciate, la italaj Esperanto-kongresoj estas renomaj pro altnivelaj, plej variaj kaj interesaj programeroj. La temo de la ĉi-jara kongreso estis "Paco ne okazas hazarde: la aktiva rolo de ĝemelurbaj rilatoj en la konstruo de eŭropa popolo". Temis pri ĝemelaj urboj, pri kiuj dum la solena inaŭguro okazanta en la urba Aŭditorio *San Barnaba*, François Lo Jacomo emfazis la gravan kaj utilan rolon de ĝemeliĝo por interkompreno, en kiu ankaŭ Esperanto povas favore kontribui. Samtempe en la loko eblis aĉeti poŝtkartojn kun speciala stampo. La posttagmezo estis rezervita por gvidata promeno tra la urbo por eksterlandanoj, dum italoj havis sian jar-asembleon.
La programo kontentigis ĉies postulojn. La matenojn plenigis seminarioj pri: "Nunaj konfliktoj en la Mediteraneo" fare de Javier Alcalde. Pri Sociaj retejoj: "Kiel starigi kaj prizorgi ilin?" AMO-seminario, zorgita de Debora Rossetti.
Dum la prelegoj ni povis ekscii pri "La historio de la okcitanaj lingvo kaj kulturo" de ties spertulo Jean-Marc Leclerq (JoMo), pri "Hibridaj trajnoj por plibonigi la medion" donis informojn Vito Tornillo. Pri "Kulturhistorio kaj pri ĝemelaj urboj" prelegis Detlef Haussner. Pri "30 oraj horoj kaj instruado en la lernejoj" informis Brunetto Casini. Pri "Ateistoj" parolis Anna Löwenstein. Pri "La biokemio de la enamiĝo" informis Luigi Fraccaroli. Pri "La itala lingvo en Svislando" kompetente parolis Mireille Grosjean. Kunvenis ankaŭ itala sekcio de ILEI.
Ĉiutage okazis libroprezentadoj. Ni ankaŭ spektis projekciadon de la filmo "Pino - hazarda vivo de anarkiisto", dediĉita al la esperantisto Pinelli. Pri "Esperanto kaj Anarkiismo" parolis Javier Alcalde.
La organizantoj prezentis kaj donis informojn pri la venonta UK en Torino, okazonta fine de julio kaj komence de aŭgusto 2023.

Pri nia aranĝo interesiĝis ankaŭ ĵurnalistoj. Venis televid-teamo, okazis intervjuoj kaj poste aperis artikoloj en loka ĵurnalo. En la publika dulingva debato "Kia rolo por la ĝemelaj urboj, pri la strebado al la paco en la Eŭropa kontinento" partoprenis reprezentantoj de la urbo.
Riĉ-enhavaj estis ĉiuj vesperaj programeroj, kiujn ni ĝuis en la subĉiela korto de la palaco *Broletto*, kie okazis Festivalo de Esperantista Kulturo. Ili estis alireblaj por ĉiuj civitanoj, pri kio zorgis la urbaj instancoj. En busoj estis pendigitaj informoj pri la UK en Torino.
La vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj. Plurlinvajn kantojn liveris kaj entuziasme kantis JoMo, koncertis Kim kaj Radio-mondo, Chiara Raggi kaj Mario Migliucci prezentis rakonto-koncerton, Piero Nissim kaj Franco Meoli kantis "la ĉiamverdajn kantojn" kaj ne mankis itallingva teatraĵo "Doktoro Esperanto".
En la programo ne mankis pluraj tuttagaj kaj kelkaj duontagaj ekskursoj, kiujn bonege prizorgis Emanuele Regano. Tuttagaj ekskursoj direktiĝis al la urboj Milano, Bergamo kaj Verona. La naturon oni povis ĝui ĉe la lagoj de *Garda* kaj *Isola* kaj dum la duontaga ekskurso oni povis gustumi vinojn en *Franciacorta*, fama loko pro vinproduktado.

Post la resumo de la laboroj polaj esperantistoj ĝoje kantis dankante al la organizantoj kaj poste la kongreso fermiĝis. Vespere ni povis denove kanti kun Debora Rossetti kaj Luigi Fraccaroli. La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero. Venontjare la Itala Kongreso ne okazos pro la UK en Torino. Do, vi ĉiuj estas jam ekde nun invititaj partopreni la Universalan Kongreson en tiu impona urbo.

*Liba Gabalda*

## La 56-a BET en Litovio



Mi veturis per trajno de Frankfurt al Kiel, kaj de tie per pramo al Klaipeda, kie BET okazis. Ni estis tri samideanoj sur la pramo, kaj tia vojaĝo estis ege agrabla. Sur la ŝipo ni bone interparolis kun geedzoj el Svislando, kiuj ankaŭ veturis al Litovio, ĉar ilia filo tie edziĝis al litova knabino.

BET okazis de la 9-a ĝis la 17-a julio 2022. Al ĝi aliĝis 263 esperantistoj el 30 landoj. La programeroj de la evento estis bonaj. Ĉeestis eĉ Duncan Charters tie, kiu proponis seminarion 'Instruado kaj lingvolernado', kaj parolis pri la temo 'Kiel paroli publike pri Esperanto kaj kiel respondi al kritikoj pri Esperanto'. Mi ĝojis renkonti denove Dalia Pileckien kaj Grazina Opulskien. Dalia mi renkontis en Les Issambres, kie ŝi prezentis tre bonan kurson, kaj Grazina mi konas jam ekde multaj jaroj, ĉar ŝi jam dum IFO ĉeestis. Certe ankaŭ vi memoras pri ŝi, ĉu ne? Ankaŭ Amri Wandel ĉeestis kaj donis la prelegon pri 'Hubble ĝis James Webb'. Kiel ĉiam dum E-eventoj ni devis decidi inter kelkaj prelegoj



kaj ekskursoj. Ilona Kou-tny proponis preleg-serion pri esperantologio.
Vespere ĉiam okazis koncertoj, i. a. de Anjo Amika, Sepa kaj Asorti, Saŝa Pilipovic kun kaj sen Georgo Handzlik aktoris kaj kantis. Mikael Bronŝtejn estas unu el tiuj kiuj aliĝis, sed ne povis veni. Tamen okazis zoom-koncerto kun li!

Klaipeda estas bela urbo. Ni promenis tra la urbo kaj vizitis i.a. iaman subteran fortikaĵon, kiu prezentas la historion de Klaipeda ekde la mezo de la 13-a ĝis la17-a jarcentoj. Ege interese. Tra la urbo fluas la rivero Dane, kaj ekde kelkaj jardekoj en centra loko de la urbo sur la rivero ĉiam videblas la granda velŝipo 'Meridianas', ĝi estas kvazaŭ simbolo de la urbo Klaipeda. Mi partoprenis tuttagan ekskurson al la 'Kurŝa ter-lango', kiu estas duon-insulo, longa 98 km kaj mallarĝa inter ĉirkaŭ 0,50 - 3,8 km. Preskaŭ en la mezo estas limo inter Litovio kaj Rusio. Ni promenadis ĝis la limo, kie oni povas rigardi al la rusia parto (Kaliningrado**)**.

Hildegard Stecay

**Mallonga somera ekskurso, sed tre emocia**
**Lipnice nad Sázavou.**

Plensentimente de la ĉeĥoj nomata „Haškova Lipnice“ – ĉar oni scias, ke la urbeto fariĝis hejmo por la verkisto Jaroslav Hašek, en liaj lastaj vivojaroj. En la loko troviĝas kelkaj (la plej gravaj) memorindaĵoj pri la aŭtoro de la romano ŠVEJK… En la j. 2013 ni rememoris 90 jarojn post lia morto. Kun amaso da homoj ni, esperantistoj, partoprenis senvualigon de la Memor-monumento omaĝe al la verkisto; laŭprave tial, ke ankaŭ ni dediĉis certan monsumon por ĝia realigo. Komence de la ĉi-jara septembro mi vizitis la Monumenton, kaj konstatis, ke inter la donuloj estas sur la unua vico videbla: Český esperantský svaz…



**Čihošť**

Oni povas konstati, ke la vilaĝo Čihošť estas same fama kiel la supre menciita urbeto Lipnice; se ne eĉ pli!...

Ni vizitis la preĝejon, kie en la j. 1949 okazis t. n. „Čihošťský zázrak“. (Rim. La misteria religia evento.)

Kaj la paroĥ-domon, kie loĝis la sacerdoto Josef Toufar. Ni estis dankplenaj al la vilaĝanoj, kiuj prizorgis la dignan memoron je la grandanima kaj grandkora Homo, kiu fariĝis la plej bedaŭr-fama viktimo de komunisma persekutado. En la domo troviĝas arkivaj memorindaĵoj, dokumentoj, eĉ urno kun la humo el la tombejo de Josef Toufar (entombigita li estas en Ďáblický hřbitov, Praha).

Sed kio estis surprizo por ni: oni vidas sur la foto, ke en la vilaĝo



troviĝas „Střed Čech“ – do fakte la geografia koro de la ĉeĥa lando.
Pri la monumento oni estas dankemaj al la loĝantoj de la vilaĝo – precipe al la „fajrobrigado“ (ĝenerale tiu ĉi organizo estas ĉie la plej vigla, ĉu?).
Fine mi diras la plej „kliŝan“ frazon: ke nia lando estas plena de belaĵoj - ĉu naturaj, ĉu memor-koncernaj. Ni vizitadu ilin!

Margit Turková

**El la redakcio:**
Per interreto deziras korespondadi:




Mi nomiĝas Augustin Kakozwa, kongano de la Respubliko Demokratia Kongo, loĝanto en la urbo Goma, kie mi instruas Esperanton al la infanaj georfoj, kiujn nia Asocio Nova Familio prizorgas. Hazarde mi trovis vian retadreson, tial mi profitas per ĝi retmesaĝi, petante ekkorespondi kun vi, laŭ via deziro. Mi alkroĉas foton pri la infanoj, kiujn mi instruas. Mi ĝojos legi vian respondon.

Augustin KAKOZWA <augukako@gmail.com>

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj:Mirka Kosnarová,  Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03  PARDUBICE,  CZ        tel. **+420 721 537970**
e-mail:  **aeh@esperanto-aeh.eu**      interreto:  **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH  2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj),  aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol!   Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola.   Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.